# internacia pedagogia revuo

Photo U.N.E.S.C.O.



Bowers N° 11.346

3-a Jaro Marto-Aprilo N° 2

3-a Jaro.

# *Internacia pedagogia revuo*

Marto-Aprilo 1958.

(*eks ESPERANTO kaj KULTURO; Internacia Pedagogia Revuo*)

Aperas dumonate sub la aŭspicioj de G.E.E., franca asocio de esperantistoj-edukistoj

## NIA KOVRILFOTO

Edukado en Hindujo. Neniam estas tro malfrue por lerni. Instruado pri iegokapablo, kiel ĝi jen estas aplikata al vilaĝanoj en Mysore, Hindujo, estas nur unu parto de la edukprogramo de UNESKO, kiu celas havigi senpagan kaj devigan edukon al ĉiuj.

(El la serio de esperantaj foto-afiŝoj eldonitaj de Unesko)

## ENHAVO

Paĝo 17. — **Problemoj pri talenta infano**
1° Pedagogia problemo (M. Boulton).
— 18. — **Pupoj** (E. Perseke).
— 20. — **Esperanto kiel bazo** (E. Malmgren).
— 22. — **Komunikoj de I.L.E.I.**
— 24. — **Teknikaj mezlernejoj** (E. Gœrlich).
— 25. — **Fruaj maturaĝuloj.**
— 26. — **Televido iras al lernejo** (B. Buckingham).
— 27. — **Nia diskutejo.**
— 28. — **Internacia Lernejo.**
— 30. — **Sur vian librobreton.**
— 32. — **3-a infana kongreseto.**

**Ĉion por la redakcio:** artikoloj, informoj, recenzotaj libroj, oni sendu al la **Redaktoro:**

A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières TOULOUSE (Francio).

**Ĉion pri administrado:** abonoj, provsendoj, specimenoj, oni sendu al la **Administranto:**

DELAGNEAU, Avrolles par ST-FLORENTIN (Yonne) - Francio.

**ABONO:** 500 fr.F. pojare: vidu 3-an kovrilpaĝon.

**Anoncetoj, reklamoj,** oni sendu al: F-ino G. JOUBERT, 21, rue Regnault, SAINT-QUENTIN (Aisne) - Francio. P.C.K. LILLE 3041-30.

**TARIFO:** Anoncetoj; 6 fr.F. = 0,20 stelo po vorto aŭ mallongigo.

Reklamoj: 1/1 paĝo 5.000 fr.F.
1/2 paĝo 3.000 fr.F.
1/4 paĝo 1.600 fr.F.
1/8 paĝo 900 fr.F.
1/16 paĝo 500 fr.F.

Rabato 10 % por sama teksto en 2 numeroj.
20 % por sama teksto en 3 numeroj.

---

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la koncernan adreson antaŭ la 20a de la antaŭa monato.

La revuo aperos fine de Januaro marto, majo, julio, septembro, novembro.

**Marjorie BOULTON**

# Problemoj pri la talenta infano

## 1° - LA PEDAGOGIA PROBLEMO

Oni povus facile plenigi longan breton per libroj pri stultaj infanoj kaj la rilataj pedagogiaj problemoj; multaj brilaj intelektoj sin koncernas pri la bezonoj de la plej mallumaj mensoj. Prave; milfoje prave, kaj honore al la homa raso; stultuloj ja plej bezonas helpon.

Tamen, ĉu ni sufiĉe atentis la problemojn, kiuj vere ekzistas, pri niaj plej talentaj infanoj? Tiuj gravas, ne nur al si mem, sed al la socio; intelekto estas altvalora krudmaterialo. Ni ĉiuj povus facile pripensi kazon, kie iom pli da inteligenteco estus evitinta katastrofon.

La vere talenta infano estas ankoraŭ pli ofte bremsita ol helpita en la lernejo — ne pro iu ajn malkompetenteco de la instruistoj, sed simple pro la tuta lerneja situacio. Li ne povas studi, en la klasĉambro-kadro, preter la studado de la gekamaradoj. Li devas sidadi kaj enui dum la instruisto reklarigas ion, kion li komprenis je la unua klarigo; li ĉiam devas atendi ĝis ĉiuj gekamaradoj ellernis tion, kion li fulmrapide ellernis. Mi memoras lecionojn, dum kiuj mi devis sidadi kaj virte, disciplinite, rigardadi la paĝon kiun mi jam parkerigis, ekzemple psalmon aŭ poemon, dum la plej stultaj klaskamaradoj trastumbladis la lernadon... kaj la plej terura klasĉambra peko estis ekrigardi alian paĝon! Nuntempe, baraktante en lingvostudoj kiuj postulus la mirindan memorkapablon de infano, mi ofte tre bedaŭras la horojn perditajn en klasĉambroj dum mi... atendadis! Kio okazas do al vere brila intelekto? La mia estas finfine nur meznivela; kiom da tempoperdo okazas en la lernejo por alttalenta infano, por geniuleto?

En multaj lernejoj oni nun iom klasifikas la infanojn laŭ inteligenteco; kaj tia sistemo bonfaras kaj al inteligentaj kaj al malpli inteligentaj infanoj, kiuj povas ambaŭ iom pli labori laŭ la persone taŭga rapideco. Tia sistemo ne solvas la problemon de la infano kiu, ekzemple (same kiel mi) estas supermeze inteligenta pri lingvaj fakoj, historio, geografio, sed submeze malinteligenta pri matematiko kaj metioj! sed normala lernejo ja ne povas solvi ĉiujn problemojn; la hejmo kaj la infano mem havas siajn devojn por ke la juna menso evoluu.

Tamen, la problemo estas pripensinda. Mi proponus provizore la jenajn demandojn.

1. Kiel ni evitu la veran tragedion, ke **la plej inteligentaj infanoj** ofte sentas grandan antipation kontraŭ lernado kaj lernejoj, ĉar ili devas konstante halti dum natura mensa evoluo, kaj enui mizere?
2. Je kia grado ni povus permesi al talentaj infanoj studi sen instruistoj, nur kun okazoj por fari demandojn kaj kontroliĝi? Ĉar iasence ĉiu inteligenta persono estas nature aŭtodidakta.
3. Ĉu ni povus pli ofte aranĝi ke la talenta infano havu la okazon studi alian fakon dum la alie perdotaj horoj? Aŭ mi eĉ kuraĝus diri, ĉu eble ne estus pli utile, ke tia infano libere promenu ol ke li sidadu kaj enuu?
4. Ĉu ni eble, eĉ nuntempe, tro emas timi ke infano « tro sciu por sia aĝo? » Pri kelkaj temoj — medicino, teologio, politiko — ja eblas; nematura menso devus eviti timigajn ideojn se eble. Sed se la infano povas fari siajn ekzamenojn neordinare frue, kaj tiel frue formeti tiujn aferojn, kial ne? Ŝajnas al mi, ke la malamikoj de cerba ekvilibro estas nek scio nek penado, sed: timo; troa streĉo; enuo; kaj konstanta sento ke gepatroj aŭ geinstruistoj kvazaŭ malhelpas nian progreson.
5. Ĉu ni sufiĉe helpas talentajn infanojn senti ke talento estas beno (ne merito, ĉar merito ĝi en si mem ja ne estas!) kaj ke uzi talentojn estas ĝoja laboro? Ĉu ni vere stimulas en tiaj infanoj la deziron plenuzi siajn talentojn kaj uzi ilin por indaj celoj?

Kiel plej kutime, mi proponas nur demandojn; sed demandoj estas la komenco de scio.

En la sekva numero aperos la dua parto de tiu artikolo:
**Socia kaj psikologia problemo**



Unua kurso por la trafikpolicistoj de Nordrejna Vestfalio pri la manpupa ludado. Prelego de la aŭtoro pri la vivigo de la pupoj

# PUPOJ


En mia 12-a jaro mi unue konstruis pupojn el ŝtrumpoj aŭ terpomoj kaj ludis pli malpli bone, sed kun granda entuziasmo. Jam tiam mi rimarkis, ke la ludantaj manpupoj faris profundan por mi nekompreneblan impreson sur infanoj. Kiam mi estis instruisto, mi uzis pupteatron, kiel rimedon por rekompenci aŭ puni, kaj estis por ili distingo, kiam la infanoj ricevis rajton ludi mem. Dum la prezentado infanoj estas tre atentemaj, tial ili ĉion, kion la pupoj faras aŭ parolas, bone memoras.

Mi konvinkiĝis, ke « Kasperle » (ĉefpupo de germana pupteatro) estas pli granda aŭtoritato ol la instruisto, ol patro aŭ patrino. Tion, kion « Kasperle » diras, konsilas, ordonas, la infanoj kun ĝojo akceptas. Ili amas ĝin, helpas ĝin, obeas ĝin kaj per li mi povis sugesti ilin fari tion, lasi tion.



Grava, malserena afero. Patrinoj kaj trafikpolicistoj kiel gastoj

# kiel instruistoj kaj edukistoj



En plena streĉiteco. Ĉe la unua tablo la genepoj de la autoro

Nun mi estas emeritulo, sed mi laboras ankoraŭ por la ŝparkaso vizitante lernejojn kaj propagadante ŝparemecon. Ankaŭ nun mia pupteatro estas bona helpanto por mi.

La granda efiko de pupoj sur la infana menso donis la kaŭzon ke la registaro de nia lando Nordrejna Vestfalio ek de 1956 organizis por la trafikpolicistoj kursojn pri la pupludado. Estis honoro kaj ĝojo por mi instrui kaj demonstri manipulon de la pupoj en tiuj kursoj.

Dum la Internacia Polic-Ekspozicio en Essen (aŭtuno 56) la unuaj grupoj (2-3 policistoj) montris prezentadojn, en kiuj la pupoj instruis pri la trafikreguloj. Ankaŭ la alilandaj policdelegitoj aprobis tiun helprimedon kontraŭ la trafikdanĝero.

Unu jam en ĉiu distrikto bonege ekipita polica pupteatro vizitas minimume unufoje dum la jaro la popollernejojn, kaj tiel la 6-10-jaraj infanoj tre facile lernas la plej gravajn trafikregulojn. La statistiko de trafikakcidentoj pruvis, ke la « Trafik-Kasperle » jam savis ne nur unu infanon.



« Kasperle » rakontas

Edgar PERSEKE
el Aĥeno

# ESPERANTO KIEL BAZO POR LERNADO de fremdaj naciaj lingvoj

## Raporto pri la jaro 1957

*de E. MALMGREN*

*(Adreso : Heleneborgsgatan 6, Stockholm)*

La celo de la Lerneja kampanjo estas utiligi Esperanton kiel devigan bazan lingvon por ĝenerala fremdlingva instruado - por tiel enigi Esperanton inter la lernejajn temojn.

Kiam mi nun faras raporton pri la agado dum la jaro 1957, mi tuj devas konstati, ke nur kelkaj landoj montris kuraĝan aktivecon. En la plej multaj landoj la geinstruistoj staras flanke de la afero kiel indiferentaj rigardantoj, montrante nenian emon kunlabori laŭ la internacie starigita plano. Kvankam la instruistoj scias, laŭ ĉiuj ĝisnunaj spertoj, ke agado en propra lando, inter la propra kolegaro, estas tute vana, se samtempe ne okazas simila agado en aliaj landoj, la plej multaj ankoraŭ atendas iun miraklon aŭ ne kapablas forlasi siajn proprajn individuajn preferojn kaj sekve ne estas pretaj lojale kunlabori por realigi planon pretigitan laŭ internacia perspektivo. Feliĉe estas kelkaj esceptoj, eĉ brilaj esceptoj.

En la unua vico troviĝas **Jugoslavio.** Jugoslavia Esperanto-Federacio aranĝis, sub la aŭspicio de Jugoslavia Nacia Uneskokomisiono, en la fino de julio pedagogian semajnon en Kranjska Gora apud Jesenice. Partoprenis 90 geinstruistoj, kio montras la grandan intereson por la afero. Certe tiu pedagogia kurso donis la fundamenton por la posta aktiveco en la jugoslaviaj lernejoj.

Laŭ la raporto de prof. Rudolf Rakuŝa, kiu brile gvidas la kampanjon en Jugoslavio, okazas dum la studjaro 1957/1958 oficialaj provkursoj (deviga E-instruado 3 horojn posemajne) en 7 klasoj. Krome okazas nur en Slovenio ne malpli ol 44 nedevigaj kursoj (kun 2-hora instruado ĉiusemajne). Fine okazas nedevigaj kursoj en Ljubljana, Maribor kaj Celje (2 lecionojn posemajne) por 58 geinstruistoj.

Car ankoraŭ restas pluraj monatoj antaŭ ol finiĝos la koncernaj kursoj, nun estas tro frue prezenti iajn konkludojn pri la rezultoj.

Sed ĉar la E-instruado en Jugoslavio nun atingis vere grandiozan amplekson, estas nepre necese, ke la apudaj landoj tuj komencu plej energiajn klopodojn por veki intereson por nia lingvo inter sia instruistaro kaj inter la lernantaro. **Se tio ne okazos, mi timas katastrofan regreson en Jugoslavio. Oni ja ne lernas Esperanton por paroli kun samlandanoj, sed por havi translimajn kontaktojn.** Sekve mi apelacias, mi **apelaciegas** al la gvidantoj de la E-movado kaj al ĉiuj unuopaj esperantistoj **aparte en Aŭstrujo, Bulgarujo, Greklando, Hungarujo, Italujo, Rumanujo kaj Svislando tuj komenci la lernejan kampanjon.**

Alia lando, kiu kuraĝe spitis la malfacilaĵojn, estas **Danujo.** La lernejan kampanjon tie gvidas la energia triopo s-roj Ole Nederland, Hans H. Frey kaj Stig Hansen, Post interrilato kun la dana instruministro, la tutlanda ĉefo de la elementaj lernejoj kaj la prezidanto de la tutlanda instruista asocio oni proponis al la dana E-instruistaro kolekti spertojn pri la E-instruado per provkursoj neoficialaj laŭ tri manieroj, kiuj estas eblaj en Danujo: 1) en mezlernejoj kiel laŭvola fako anstataŭ la franca; 2) en elementaj lernejoj deviga E-instruado post permeso de la lokaj aŭtoritatuloj; 3) en lernejaj libertempaj kluboj. Dum la aŭtuno komenciĝis E-instruado en unu klaso laŭ la unua maniero, unu laŭ la dua maniero kaj 4 laŭ la tria. La kursoj finiĝos en junio.

Dana Instruista E-Asocio aranĝis en oktobro instrukcian kurson en Vejle. Partoprenis 12 geinstruistoj. Sekve oni esperas dum la venonta studjaro pliampleksigi la lernejan kampanjon.

Ankaŭ la danaj gvidantoj akcentas, ke estas nepre dezirinde, se oni volas pligrandigi kaj sukcesigi la lernejan kampanjon, ke la E-lernantoj havu eblecon utiligi la lingvon ekz. per reciprokaj vizitoj ĉe eksterlandaj gejunuloj. La danoj aparte turnas sin al la **germanaj, nederlandaj kaj belgaj geinstruistoj.**

En decembro la Dana Instruista E-Asocio turnis sin al la instruministro kun la propono, ke Esperanto estu instruata en la du lastaj klasoj de la elementa lernejo por tiuj lernantoj, kiuj montris nekapablon enkapigi la anglan aŭ la germanan lingvon. (En Danujo oni devige instruas la anglan lingvon ankaŭ en la elementaj lernejoj, sed oni rajtas anstataŭigi ĝin per la germana). La ministro ankoraŭ ne respondis.

En **Norvegujo** proks. 70 geinstruistoj apartenas al la landa ligo. Car tiuj instruistoj troviĝas en preskaŭ same multaj lokoj, estas malfacile starigi efektivan kunlaboron por sinturno al lokaj lernejestroj. Dum la aŭtuno komenciĝis kelkaj neoficialaj kursoj en la kadro de la lerneja programo kiel « liberhora instruado ». Raportoj pri tiuj kursoj venos en la fino de la studjaro.

La norvegoj, sub gvido de s-ro Johan Matland, daŭrigas siajn penadojn atingi aprobon de la sekcio pri eksperimenta instruado ĉe la tutlanda lerneja direkcio. Cetere la norvegoj, aparte la **norvegaj aŭtoritatuloj** kun scivolo demandas kiel decidas la **svedaj aŭtoritatuloj** kaj **reciproke.** Evidente neniu kuraĝas fari mem la unuan paŝon.

La evoluo en **Svedlando,** mia propra laborkampo, estis por mi granda disreviĝo. Jam en la pasintjara raporto mi informis, ke la Stokholma lerneja direkcio malaprobis nian proponon pri provkursoj. Mi turnis min al la E-instruistoj tra la tuta lando (proks. 200), sed mia alvoko estis preskaŭ tute vana. Nur 2 aŭ 3 geinstruistoj nuntempe gvidas E-kurson. En cirkulero mi ĵus admonis miajn svedajn kolegojn, ke ĉiu en sia loko plenumu almenaŭ tiujn ĉi proponojn : 1) En sia klaso rakonti pri Esperanto, ĝia celo kaj ĝia strukturo (ĉar tiuj E-instruistoj ja estas spertuloj pri nia afero, kaj ili ne devas permesi, ke nekompetentaj personoj influu la lernantojn per sia nescio kaj per misprezento de nia lingvo) ; 2) Kolekti laŭeble malgrandan rondon de kolegoj kaj instrui ilin en Esperanto. - Sekve ni havas ankoraŭ longan vojon irotan en Svedujo.

En decembro Sveda Esperanto-Instituto faris proponon skriban al la tutlanda lerneja direkcio, ke Esperanto estu permesata kiel temo dum la t.n. « libera instruado » (2 horojn posemajne) en la 2 lastaj klasoj de la elementa lernejo. Pro fatala miskompreno inter rektoro Söderberg kaj mi, kiuj fidis unu la alian, neniu el ni persone vizitis la koncernan ĉefon de la direkcio por buŝe priparoli kaj klarigi nian proponon. Sekve... mi volas diri eĉ : **tute nature** la direkcio malaprobis la proponon. Sed la malaproba decido enhavas i.a. la frazon « La instruplano permesas kiel temojn en la « libera instruado » **företrädesvis** (= prefere, antaŭ ĉio) maŝinskribadon (tajpadon)... k.t.p. ». Konsekvence la pli granda parto de la 72 lecionoj (2 horojn posemajne oble 36 semajnoj) devas enhavi instruadon laŭ la lerneja plano, sed ekz. 35 horoj povas esti uzataj por E-instruado. Ni nun esploras tiun eblecon.

El **Nederlando** mi ne povis ricevi raporton pri la agado pro la forvojaĝo de s-ino C. M. Burger, direktorino de « Esperanto ĉe la instruado », la gvidantino de la nederlanda sekcio por la lerneja kampanjo.

En **Bulgarujo** instruisto Nikolaj Pörvanov en Kolarovgrad komencis provinstruadon post aprobo de la lerneja direkcio.

En **Novzelando** oni devis prokrasti la oficialan sinturnon al la registaro pro la atendita kaj poste okazinta ŝanĝo de la registaro. Tamen sen la scio de s-ro MacGill, la gvidanto de la lerneja kampanjo en Novzelando, parlamentano Götz, nova Esperantisto, propriniciate faris en la parlamento la demandon al la tiama instruministro, ĉu oni povas enkonduki Esperanton en la mezlernejojn. La ministro neis la eblecojn. Nun oni preparas novan proponon, kiu harmonios kun nia internacia plano, por prezenti ĝin al la nova instruministro.

En **Finnlando** s-roj Vilho Setälä kaj Joel Vilkki dum la aŭtuno turnis sin al la instruministro kun la propono pri provinstruado de Esperanto kiel baza lingvo. Ĝis nun ne venis respondo.

En kelkaj landoj, aparte en **Ĉeĥoslovakio,** mi trovis grandan intereson por la lerneja kampanjo, sed bedaŭrinde la cirkonstancoj ankoraŭ ne ebligas realigon de la plano.

Kun pluraj aliaj geinstruistoj en diversaj landoj mi interrilatis pri la lerneja kampanjo, sed mi ne ricevis sciigojn pri konkretaj rezultoj. Mi scias, ke tio ofte dependas de la fakto, ke la koncernaj personoj tiel energie dediĉas sin por plenumi sian instrulaboron, ke ili ne vidas eblecon trovi tempon por leterskribado kaj raportado. Tio estas bedaŭrinda fakto, ĉar sukcesa laboro sen konkluda raporto estas kiel gajnita batalo sen favora packontrakto.

Jam je la komenco de la lerneja kampanjo mi antaŭvidis, ke ni vidos la konkretajn rezultojn nur iom post iom. La preparoj en kelkaj landoj tamen nun evoluis tiel bone, ke ili estas fundamento por la ekago ankaŭ de aliaj landoj. Kiam ni havos la unuajn raportojn pri la rezultoj en la provlasoj, en Jugoslavio, Danujo, Norvegujo kaj Bulgarujo, la diverslandaj fakaj instruistaj revuoj certe volonte publikigos artikolojn pri la spertoj. Estas mia espero, ke E-instruistoj en la diversaj landoj tiam ne preterlasos tiun eblecon informi la kolegojn pri nia afero.

**GEINSTRUISTOJ,** kiuj deziras ricevi detalajn informojn pri la « lerneja kampajno », bonvolu skribi al S-ro MALMGREN, Heleneborgsgatan 6, STOCKHOLM.




# KOMUNIKOJ de I. L. E. I.

## *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*

★

La Ligo, kiu fondiĝis en 1949, konsistas el instruistaj asocioj (aŭ sekcioj). Ĉiuj anoj de la membro-asocioj estas anoj de I.L.E.I. En landoj, kie ne estas membro-asocio, instruisto povas esti individua membro de I.L.E.I. per abono al la oficiala organo « Instruista Letero ».

Ĝisdate la membro-asocioj estas: - Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Nederlando, Svedujo.

Ĉiu membro-asocio elektas sian reprezentanton, kiu estas Komitatano de I.L.E.I. La Komitato elektas la Estraron.

En landoj, kie ne estas membro-asocio, I.L.E.I. havas representanton, kiu kolektas kaj disdonas informojn, kaj kiam la cirkonstancoj taŭgas, starigas instruistan grupon.

La oficiala organo de I.L.E.I. estas « Instruista Letero », redaktata de S-ro Oskar Svantesson, Göteborg, Skonertgatan I, Svedujo.

« I.L. » aperas neregule sed sufiĉe ofte, kaj estas la aktuala kunligilo de nia instruista komunumo. Por 10 sinsekvaj numeroj oni pagas po 4 sv.kr. pageblaj per internacia poŝtmandato, aŭ per steloj aŭ per internaciaj respondkuponoj.

Ĉe la Centra Oficejo, 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo, funkcias Koresponda Servo Internacia por lernejanoj kaj profesiaj instruistoj. La Sekretario registras lernejojn kie oni instruas Esperanton kaj klopodas interrilatigi tiujn, kiuj deziras interkonatiĝi. La celo estas formi mondkomunumon de lernejoj kaj instruistoj por interŝanĝi spertojn kaj interkonatiĝi. Respondkupono estas necesa.

La Ligo estas kunlaboranta asocio kun U.E.A. kaj estas agnoskita de UNESKO, kiel organizaĵo, kun kiu ĝi havas neoficialajn rilatojn pri aferoj komune interesaj.

Ĉiujare, en la kadro de la Universala Kongreso de U.E.A. la Ligo okazigas sian aferkunvenon, kie estas pritraktataj la aktualaj aferoj de la organizaĵo, kaj la diversaj spertoj kaj opinioj de la membroj. Samtempe estas aranĝita Pedagogia Diskutado, kiu donas okazon por libera interŝanĝo de opinioj diversspecaj kaj diversnaciaj pri temo profesia, ne-Esperantista, kun celo al pli bona scio kaj interkompreniĝo.

V. C. Nixon, Sekretariino.

# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

★

*Aktuala Listo de la Reprezentantoj :*

**ALGERIO: S-ro F. Micoud,** B. P. 88 Nemours (Tlemcen).

* **AUSTRALIO: F-ino G. Pollard,** Second Avenue, Riverton, West Australia (Komitatano).

* **AUSTRUJO: S-ro L. Gschanes,** Pelzgasse 7-11-17, Wien XV (Komitatano).

**BELGUJO: S-ro Luc de Marré,** Oudaen, 28, Antverpeno.

* **BRITUJO: F-ino V.C. Nixon,** 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30 (Sekretariino).

**BULGARUJO: S-ro Simeon Hesapĉiev,** « Izdatelstvo Narodna prosveta », str. Vasil Drumev 5, Sofio.

**DANUJO: S-ro Soren Andresen,** Friggsvej 10, st. tv. Fredericia.

**FINNLANDO:** atendata.

* **FRANCUJO: F-ino J. Dedieu,** 70, avenue Victor-Ségoffin, Toulouse. (Prezidantino).

* **GERMANUJO: S-ro Ernst Bepperling,** Grosse Promenade 2a, Wetzlar. (Estrarano).

**HISPANUJO: S-ro E. Calvet Prats,** Plaza General Sanjurjo 7, Tarragona.

* **ITALUJO: D-ro Leandro Taccani,** str. F. Vigano, 4, Milano. (Estrarano).

**IZRAELO: Prof. Kohen-Cedek,** P.O.B. 7015, Jerusalem.

* **JAPANUJO: S-ro Suzuki Kiyosi,** 816, Higasi-Oizumi, Nerimaku, Tokio. (Komitatano).

**JUGOSLAVIO: S-ro Vladimir Muzic,** Gunduliceva 35, Zagreb.

**MAROKO: S-ro B.S. Ohanas,** Immeuble Alliance, Arset-el-Maâch, Marrakech.

* **NEDERLANDO: S-ro P. Korte,** Prins Bernhard 1.19, Veendam. (Komitatano).
**Dua: S-ro J. Verbruggen,** Oosterhesselenstraat 560, Hago.

**NORVEGUJO: S-ro Erling Holten,** Trondhjem, Leangen i.Strinda.

**POLLANDO: Prof. J. Toczyski,** Gdansk-Wrseszcz, ul. Grunwaldzka, 6 m. 3.

**PORTUGALUJO: D-ro Pedro Serra,** R. Marques Gomes 22, Aveiro.

* **SVEDUJO: S-ro Oskar Svantesson,** Skonertgatan I, Göteborg. (Estrarano kaj Redaktoro).

**SVISLANDO: S-ro Claude Gacond,** Crêt 78, La Sagne, Neuchatel.

**URUGVAJO: Prof. M. Fernandez Menendez,** 21, de Setiembre 2405, Ap 8 Montevideo.

* *La asteriskoj signas la membro-asociojn de I.L.E.I.*

D-ro Ernesto Jozefo GŒRLICH

# TEKNIKAJ MEZLERNEJOJ
## EN AŬSTRUJO

*Supera Studa Konsilisto, Profesoro, Doktoro E. J. Gœrlich, nakiĝis en 1905. Li estis profesoro pri lingvoj, historio kaj geografio en seminario por edukado de instruistinoj.*

*En 1938, li perdis sian oficon kiam la Germanoj okupis Aŭstrujon. Post la mondmilito li fariĝis profesoro en viena teknika mezlernejo. Jam kiel 14-jara knabo li esperantistiĝis en 1918 kaj estis instruata de la fama pioniro* Franz Zwach, *tradukinto de multaj esperantaĵoj. Nun D-ro Gœrlich krome estas lektoro pri Esperanto en la ŝtataj altlernejoj (universitatoj) de mondtrafiko kaj mondkomerco en Wien'o.*

La instruado en Aŭstrujo enhavas ankaŭ la grandan sektoron de la profesia instruado: la teknikajn mezlernejojn. La fondinto de ĉi tiu speco de lernejo estis la famkonata profesoro Wilhelm Exner, kiu konatiĝis kun ili en Franclando. Vere, la plej malnova lernejo en Vieno de ĉi tiu fako, la « **Technologisches Gewerbemuseum** », estas nomita rigarde al alia lernejo de la sama speco en Parizo.

Hodiaŭ, la sektoro de la profesiaj mezlernejoj kompleksas apartenan sektoron en la federacia instru-ministrejo de Aŭstrujo: ilia ĉefo estas la ĝeneraldirektoro inĝeniero Franz Cech, tre vigla, lerta kaj laborema pedagogia homo de grandformato. Li transprenis la gvidadon de sia sektoro post la dua mondmilito, dum la jaroj de la rekonstruado de la politika kaj ekonomia vivado en la aŭstruja respubliko, kaj li gvidadis la sektoron ĝis hodiaŭ kun grandegaj sukcesoj.

La teknikaj mezlernejoj en Aŭstrujo havas la celon perfektigi la gelernantojn je la praktika kaj teoria bazoj por iliaj venontaj profesioj. La gelernantoj faras enir-ekzamenon. Ili estas 14-jaraj kaj venos el la diversaj aliaj lernejoj, ekzemple el popollernejoj, gimnazioj k.t.p. La instruado estas kvinjara. La unuaj du jaroj estas jaroj de la tielnomata « faklernejo ». En la dua jaro oni elektas per certa sistemo de psikologiaj testoj la plej bonajn gelernantojn, kaj ili eniras en la tiel nomatan « superan kurson » de la teknika mezlernejo. La supera kurso daŭras tri jarojn. Post la fino la gelernantoj faras finkonkurson en la formo de ŝtata ekzameno. La sukceso en ĉi tiu konkurso ebligas al la gelernantoj la eniron en la profesiajn universitatojn de teknika kaj simila fakoj, sed ankaŭ la eniron en la ĉiutagan profesian vivon. La vizitintoj de la dujara « faklernejo », kiuj ne estas taŭgaj por la supera kurso, faras trian finjaron, kaj eniras en la industrion kiel « faklaboristoj ». Tiamaniere ankaŭ ili ne perdas la du lernjarojn.

La teknikaj lernejoj havas multajn fakgrupojn, en kiuj la gelernontoj estas enskribataj; ekzemple per maŝinkonstruado, per elektra tekniko, per komerca tekniko, per arhitekturo, per radio- kaj telefon-konstruado, per aŭtomobilkonstruado k.t.p. La instruado de la teoriaj fakoj estas gvidata de profesoroj, kiuj studadis en universitatoj. La instruado en la praktikaj fakoj estas en la manoj de faklaboristoj kaj majstroj de koncerna fako. La gelernantoj havas 44-46 lernhorojn semajne, inter ili estas 16 « horlecionoj » en la praktika instruado. Pli multaj ol en la aliaj mezlernejoj de Aŭstrujo. Malgraŭ tio ĉiujare multaj kaj multaj knaboj kaj knabinoj volas fari la enirekzamenojn en la teknikajn mezlernejojn. Bedaŭrinde ne havas sufiĉajn eblojn por la instruado de tiel multaj gelernantoj. Kelkaj el ili ne povas eniri la deziratan lernejon, ne pro malsukceso en la ekzameno, sed pro tro-pleniĝo de la lernejo.

La famo de la aŭstrujaj teknikaj mezlernejoj transiris jam multajn landojn de la mondo. Multaj gevizitantoj de la aŭstruja respubliko vizitas ankaŭ, precipe en la ĉefurbo Vieno, la teknikajn lernejojn. La direktoroj kaj la profesoroj de ĉi tiuj lernejoj tre volonte akceptas la vizitojn de geamikoj al la tuta mondo. Iu ajn, kiu volas viziti iun aŭ la alian lernejon dum sia vojaĝo trans Aŭstrujo skribu al la **General direktion für das berufsbildende Schulwesen in Oesterreich, Wien, I. Minoritenplatz 5, Bundesministerium für Unterricht.**

**La instru-problemoj tre diversas tra la mondo**

Sekvos la artikolo de Inspektoro F. CADENEL pri:

**Kelkaj karakterizaĵoj de la franca ŝtata instruado**

# Fruaj maturaĝuloj

## kaj

# malfruaj « post-dekjar-uloj »

:o:

Antaù kelkaj tagoj mi aùdis la plendojn de plenkreskuloj kelkafoje instruantaj geknabojn, pri la nuntempa malfacileco akceptigi de la gejunuloj ordinaran disciplinon, kiu precipe koncernas la « post-dekjar-uloj ». Kompreneble iu ajn instruisto povus diri, ke tio estas neniel nova, sed tiuj personoj asertas, ke la problemo estas pli grava ol antaù kelkaj jaroj.

Verŝajne ili pravas. Per centoj da rimarkoj ni povas konstati pli kaj pli grandan mankon de socia disciplino ĉe la post-dekjar-uloj. Vandalfaroj kontraù novkonstruitaj domoj kaj lernejoj estas sufiĉe kutimaj, kaj, en pli malalta grado, multaj el ni ne povas ĝui bonan filmon pro la malĝentilega konduto de gejunuloj, kiuj verŝajne trovas feliĉon nur en bruo, preteratentante la komforton kaj la plezuron de la aliaj personoj.

Eble la respondo kuŝas en la fakto, ke la nunaj post-dekjar-uloj ĝuas sendependon pri movoj kaj mono, kiu antaù 20 aù 30 jaroj estis tute neimagebla.

La rezulto estas, ke, antaù ol esti sufiĉe maturaj korpe kaj mense kaj tial esti lernintaj la neceson de respondeco kaj mem-regeco, ili « forĵetas la ŝarĝon », kiel la plenkreskuloj; kaj kompreneble ilia koncepto pri plenkreskeco estas « plenlibera agado ».

Ili devus paùzi kaj pripensi la fakton, ke la plenkreskuloj, kiuj agas laùplaĉe preteratentante la kutimajn sociajn decregulojn, ĝenerale fine sin trovas (aù almenaù devus sin trovi) en malliberejo.

Pro tio estas logike, ke ankaù al kelkaj el tiuj gejunuloj tio okazos, kiam ili pliaĝiĝos. Ĉar kio rezultas se oni posedas ĉion, kion oni deziras, kaj ĝuas plenkreskulan staton, kiam oni estas ankoraù juna ? Tute simple oni dum jaroj restas junulo kaj, kiam oni atingis la kutime « spertan aĝon », regas la sama manko de respondeco.

Ĉu ne estas plensignifa la fakto, ke la nunaj idoloj de multaj el la post-dekjar-uloj estas pli ol 20-jaraj sed vestiĝas kaj kondutas, multe pli junece.

James Dean, kiu estis rigardata, kiel la « simbolo » de la « torturita junularo », estis 24-jara, kiam li malfeliĉe mortis en aùto-akcidento. Nun, mi estas nur apenaù mezaĝa, sed, kiam mi estis 18-jara, miaj 24-25-jaraj amikoj estis terure maturaj kompare al mi, superuloj kaj gvidantoj.

Ni revenu do al iu speco de disciplino kiu restarigos la kapablon ĝuste taksi la valorajn aĵojn kaj ecojn ĉe la post-dekjar-uloj kaj evitigos al ni la spektaklon de tiuj multaj infanecaj plenkreskuloj kaj maljunecaj infanoj.

El *The Socialist Leader* (28 sept. 57).

Trad. P.B.

★

**Bryan BUCKINGHAM**

# TELEVIDO
# iras al LERNEJO

En la klasĉambroj de lernejoj en Britujo dum la nuna semajno (de 23-a de Septembro 1957) okazos revolucio, ĉar eksperimento en edukado per Televido serioze komenciĝos. Kaj la B.B.C. (British Broadcasting Corporation = Brita Radio Korporacio) kaj la Independant Television (I.T.V.) (Sendependa Televido) ĉiutage dissendos programojn por lernejoj.

Knaboj kaj knabinoj inter la aĝoj de 11 kaj 16 jaroj estas atendataj en proksimume mil lernejoj rigardi la programojn de la B.B.C. de la venonta mardo posttagmeze.

Tiuj programoj daŭros 25 minutoj.

Kaj ek de morgaŭ (23 Septembro 1957) en la regionoj ĉirkaŭ Londono, la mezlandaj provincoj kaj Skotlando, kovrataj de I.T.V., geknaboj en 300 ĝis 500 lernejoj verŝajne rigardos al la retaro de edukadaj prezentadoj dum labortagoj de la kontraktintoj I.T.V.

## KUNLABORADO DE RADIO DISSENDOJ

La du organizajoj jam petis, ke Lokaj Edukadaj Autoritatoj tra la lando kunlaboradu en la eksperimento. Ĝi estas, kaj devas resti, dum longa tempo, eksperimento, malgraŭ tio, ke I.T.V. komencis dissendi programojn por lernejoj en Majo de la nuna jaro antaŭ ol B.B.C., kaj tiel ĝi gajnis valoran sperton.

## TRI CELOJ

Sole en la regiono de Londono, la London County Council (L.C.C. = Konsilantaro de Londona Regiono) jam instalis televidajn aparatojn en 20 lernejojn por ke gelernantoj rigardu la programojn de B.B.C.

Estos lasata al la bontrovo de lernejestroj decidi ĉu gelernantoj ankaŭ rigardu la programojn de I.T.V. diris oficisto de L.C.C.

La celoj de la B.B.C. kaj de I.T.V. en tiuj ĉi programoj estas samspecaj.

Ambaŭ penos provizi vivantan vidan helpilon al ekzistantaj metodoj de instruado kaj samtempe ekzameni kaj testi ĉiajn edukajn eblecojn de televidilo.

Fraulino Enid Love, estro de la televida departemento de la B.B.C. por lernejoj, diras, ke estas tri ĉefaj celoj :

— Unue, utiligi la ege grandajn eblecojn de televido en la klasĉambro kiel aldono al normalaj metodoj de instruado.

— Due, stimuli la intereson de la gelernantoj tiel, ke instruistoj povu konstrui sur tio, kaj.

— Trie, akcenti punktojn, kiujn la instruisto jam faris dum la rutinaj lecionoj.

F-ino Love respondas al la kritikadoj, ke knaboj kaj knabinoj, kiuj jam en siaj hejmoj rigardas troe al la televido de nun vidos ankoraŭ pli da ĝi en la klasĉambroj, jene :

## TREJNADO PRI GUSTO

Ni esperas, ke, kun la tempopaso, televido en lernejoj instigos al pli kritikema vidado kaj al speciala trejnado en gusto, ŝi diras. En kiu ajn okazo, neniu lernanto rigardos pli ol unu aŭ eble du programojn po duon-horo dum unu semajno.

La programoj de B.B.C. kaj de I.T.V., kiuj komenciĝos dum la nuna semajno, ĉefe celas lernantojn en duagradaj modernaj lernejoj, sed iam estonte programoj estos provizataj por preskaŭ ĉiaj specoj de lernejoj.

La du televidaj organizaĵoj strete (*) kunlaboros kun lernejoj por ke iliaj programoj povu esti muldataj laŭ la formo, kiun instruistoj konsideros pli efika kaj helpema. La B.B.C. kaj la I.T.V. jam petis lernejestrojn sendi raportojn pri reagoj al iliaj programoj kaj fari konstruajn proponojn por plibonigo.

(*) *Streta :* Itale : *stretto, stretta;* Angle : *closely;* France : *serré, étroit.*
*Sir :* Titolo angla. — E.-E. Y.

Tamen, inter edukistoj estas diversaj vidpunktoj pri la uzado de televido, kiel helpilo por instruado. Unu sinjoro Sir Eric James (*), ĉef-estro de liceo de Manĉestro ĵuris antaŭ nelonge, ke televidilo eniros lian lernejon nur trans lia kadavro.

Malgraŭ tio, la okuloj de ĉiu patro, patrino kaj instruisto tra la lando kritike sekvados la iradon de tiu ĉi eksperimento dum la venontaj kelkaj monatoj.

*Tradukis el angla lingvo el « News of the World ».*
(22 Septembro 1957).

E.-E. YELLAND.

---



# NIA DISKUTEJO

## *pri* La estinteco, estanteco kaj estonteco de « Dek-Unu-Plus »

(I. P. R. p. 9)

★

Tradukante la artikolon pri la ekzameno « Dek-unu-Plus » el la dimanĉa gazeto « News of the World », mia malnova amiko E.-E. Yelland faris utilan kaj laŭdindan laboron. Bedaŭrinde mankas la tradukista komentaĵo, mia-opinie ĉiam necesa por interpreti nacilingvan artikolon aŭ libron por legantaro tutmonda. Aliflanke, ĉar jam de jaroj sinjoro Yelland ne loĝis en Britujo, mankis al li la ebleco, bone juĝi la verecon de la priskribo.

Fakte la artikolo estas pli bona, ol oni atendus de tia sensacia ĵurnalo. Mi volus tamen precipe bedaŭri la troigon pri la abomeno kontraŭ la ekzameno kaj la timego pri ĝi, ĉe la ĝenerala popolo.

En mia lando la troa premo al la gelernejana menso estas multe neobservebla kompare kun Francujo, kie mi havis okazon diskuti la aferon kun pluraj personoj diversrangaj. Aparte tio estas observebla ĉe la liceoj de ambaŭ landoj.

Ĉe ni ekzistas infanoj premataj kaj gepatroj tro ambiciaj. Sed pri 95 el cent mi certas, ke la ekzameno estas trankvile akceptata kiel normala prov-enda malfacilaĵo de la vivo.

Oni povus pli multe akcenti, ke la allogo de ofico « blankkoluma » estas malplia ol iam, tiom bone estas pagataj multaj metiistoj.

K.R.C. STURMER.

---

Kun intereso mi legis la sugeston de mia malnova kolego S-ro K.R.C. Sturmer.

En mia opinio :

1. Mi faris fidelan tradukon de la artikolo.
2. S-ro Graham Stanford, ĵurnalisto, intervjuis diversajn edukistojn, eminentajn personojn kaj gvidantojn de industriaj entreprenoj, ĉiuj, kiuj bone scias la « por kaj kontraŭ » pri la ekzameno.
3. Miaparte ne estus prudente komenti nefavore pri afero pri kio aŭtoritatoj de edukado ne estas ankoraŭ de la sama opinio.
4. PER mia traduko kaj PRO la presigo de la artikolo en I.P.R. NI, sendube, AKIRIS LA SIMPATION de S-ro Graham Stanford al nia lingvo kaj, eble, nefavora komento farus S-ron Graham Stanford kontraŭulo al nia lingvo.
5. Mi persone ne scias la opinion de geknaboj, kiujn la « Dek-unu-Plus » ekzameno tuŝas. Efektive, mia opinio ne partoprenas en la artikolo.
6. Se amiko Sturmer ne estas en akordo kun detaloj donitaj en la artikolo kaj, se li SCIAS ion alian, kio estas malsimila al io esprimita en la artikolo, estas okazo por li esprimi sian opinion, scion aŭ kritikon en aparta artikolo.

E.-E. YELLAND.

# LA INTERNACIA LERNEJO de la S.H.A.P.E.-vilaĝo

★

*Jen resumita artikolo pri internacia lernejo. La originalo aperis en* « L'Education Nationale » *(12/22, 14 Junio 56, p. 4-5). Ni opinias ke interesos niajn legantojn la lingva instrumetodo. Per ĝi infanoj laŭdire ellernas la francan en ses monatoj. Oni ricevas la konvinkon ke se en simila lernejo oni aplikus Esperanton kiel ĉeflingvon, oni atingus grandiozan rezulton. Oni ne lernus malpli longe, sed oni trafus pli altan nivelon. Sed kiu registaro elspezus por lingvo, alia ol la propra ?*

En 1952 la franca ministerio pri edukado malfermis lernejon por la infanoj, kies familioj, francaj aŭ alilandaj, venis en la regiono de Louveciennes kaj Saint-Germain pro aparteno al la internacia organismo S.H.A.P.E.

Ja necesis surloke eduki tiujn infanojn kiuj foriris, pro neceso, de siaj hejmregionoj.

Post kvar jaroj da funkciado la nova kreaĵo potence evoluis. La direktoro de la internacia lernejo de S.H.A.P.E.-vilaĝo, S-ro TALLARD, universitata agregaciulo, bonvolis en intervjuo skizi ties principojn.

**- Tre multaj, eĉ ĉe la universitato, ne konas la ekziston de la Internacia Lernejo aŭ opinias ĝin gvidata de S.H.A.P.E. mem. Ĉu vi bonvolas precizigi tiun punkton, sinjoro direktoro?**

- Nia rekrutado estas internacia, sed nia lernejo estas franca establaĵo, filio de la liceo Marcel Roby en Saint-Germain.

La ejoj apartenas al diversaj ministerioj aŭ servoj sed la franca personaro dependas de la Ministerio de la Franca Edukado. La programoj necese estas pli flekseblaj ol tiuj de kutima franca liceo sed larĝtrajte ili estas la samaj. La instruado estas submetita al la kontrolo de la kvalifitaj aŭtoritatoj laŭ la niveloj: ĝeneralaj inspektoroj de la Nacia Edukado kaj inspektoroj de la unuagrada instruado.

**- Kio estas la graveco kaj varieco de via lerneja kiomo?**

- Ĉe la komenco estis 18 enskribiĝintoj. Nun la kiomo estas 650 lernantoj. Ĝi egalvaloras la lernantaron de mezgranda franca establaĵo sed ĉi tie ĉio komplikiĝas pro la naciara mozaiko. Niaj lernantoj ja apartenas al 15 nacioj. Ili edukiĝas de la 11-a klaso al la 3-a klaso de la duagrada instruado. La dua klaso dividiĝas proksimume egale inter knaboj kaj knabinoj, inter francoj kaj alilandanoj, sed dum la klasoj de la unua ciklo (6-a ĝis 3-a klaso) arigas proksimume la trionon de la kiomo, la bubaj kaj elementaj klasoj arigas proksimume la du trionojn.

**- La nombro de la francaj lernantoj iom surprizas. Ĉu en la servo de S.H.A.P.E. estas tiom grava franca oficistaro?**

- Sed ni akceptas ne nur la infanojn de S.H.A.P.E.-oficistaro! 45 % el niaj lernantoj apartenas al familioj el plej diversaj medioj. Ili tien venas pro oportuno aŭ prefero. Same venas infanoj de alilandanoj loĝantaj en Parizo: diplomatoj, administrantoj, komercistoj... Ili ĝojas pro instruado disdonata kaj en la franca kaj en la gepatra lingvoj. Naŭ lingvoj estas parolataj ĉi tie kaj niaj junuloj alvenas ĉe la optimuma aĝo por lingvo-alkutimiĝo.

**- Vi parolis pri la neceso de fleksebla programo. Al kiuj apartaĵoj ili devas adaptiĝi kaj laŭ kiuj principoj?**

- Temas pri tri principoj: unue en franca lernejo, la instruado estu franclingva. Due, dum la infanoj devas alkutimiĝi al pli bona internacia kompreno, ili tamen gardu la naciajn fidelecon kaj kutimojn. Trie nepre ne eblas, ke alilandaj lernantoj post studo en la lernejo ne povu obteni la saman titolon, kiel en sia lando.

Tial la ĝeneralaj instruoj estas franclingvaj. La programoj sekvas la francajn programojn. Tamen la profesora konsilantaro kelke rajtas ĝin modifi. El kiu ajn nacio, la lernantoj facile sekvas tiujn komunajn kursojn.

**- Sed vi certe akceptas lernantojn kun supraĵa kono de la franca?**

- La pliparto el la alilandanoj tute ne konas la francan ĉe sia alveno. Komence oni instruas ilin sialingve, krome ili lernas la francan tri horojn po-tage. La instruistoj establas la progresadon de la lecionoj sur la laboraĵoj de la komisiono pri la elementa franca lingvo. En la posttagmezo ili aŭdas la ĝeneralajn kursojn en la franca. Post tri monatoj de tiu trejnado, ili senpene sekvas kaj post ses monatoj ili ne plu sentas malfacilon en la kompreno aŭ esprimado.

**- Ĉu vi facile varbas viajn instruistojn?**

- Nepre! La francaj edukistoj estas tie nomumitaj de la koncernaj kompetentaj instancoj, kiel por iu ajn alia posteno. Rilate la alilandanoj, ili posedas la samajn diplomojn kiel en siaj landoj kaj ili estas pagataj de la koncernaj registaroj. Tiu diverseco necesas por certigi la dulingvan instruadon.

**- La intelektaj disciplinoj postulas ĉe vi pli da tempo ol aliloke. Ĉu vi tamen povas atenti la korpajn, manajn, k.s., aktivaĵojn?**

- La edukiva valoro de tiuj aktivaĵoj neniel estas oferita!

Ĉiuj lernantoj regule sekvas la korpedukajn lecionojn kaj ĉiuj ankaŭ praktikas unu aŭ plurajn manlaborojn: pentrado, lignogravuro, modlado, bindado, muzikil-farado. Por la knabinoj kursoj pri mastrumado kaj kulinado.

La aĉeto de la materialoj kaj inter ili de la aŭdo-vidaj aparatoj eblas dank'al jara subvencio de S.H.A.P.E.: temas pri la unuanura interveno de tiu organismo.

Tiuj aktivaĵoj tre valoras: per komuna laboro kreiĝas firmaj ligiloj inter individuoj de malsamaj nacioj aŭ rasoj. Iom ĉie tra la mondo konstruiĝas similaj liceoj. Multaj jam funkcias en Kanado, Svisio, Luksemburgo, en Bonn, en Hago, ktp...

RESUMIS A. A.

# GRAJNOJ EN VENTO

Klasoj kaj Esperanto-Junulgrupoj el ĉiuj landoj, nia lernejo nun organizas la 12-an tutmondan interlernejan rondon « GRAJNOJ EN VENTO » por 6- ĝis 16-jaraj gelernantoj!

La pruvo jam estas farita, ke partopreno en multnacia rondo kun propra eldono de gazeto estas bonega solvo por alproksimigi tutmondan junularon. Tuj skribu al ni!

OSMOGODIŜNJA ŜKOLA « NEVEN KIRAC », **PULA**, POŜT-FAH 24, JUGOSLAVIO.

★

La Centra Oficejo de « GRAJNOJ EN VENTO », 66, rue des Pins, BIENNE-BIEL, Svislando/Suisse, daŭre akceptas aliĝojn por siaj 12 internaciaj rondoj (rondoj por 4-8, 8-15, 15-20 jaraj gelernantoj). Petu informojn!

★

# Administra Angulo




Okazis diversaj ŝanĝoj en la I.P.R.-organizado. Ĉar multaj perantoj ne sufiĉe frue sciis la novan prezon de abono, okazis iaj miskomprenoj. Kelkaj abonantoj tro pagis, aliaj ne sufiĉe. Bonvolu senkulpigi nin, mi petas.

Kion fari? Al tiuj kiuj ne sufiĉe sendis (almenaŭ 10 %): se ne tro kostos al vi, bonvolu kompletigi. Al tiuj kiuj tro pagis: ni konsideras, ke vi donacis la suplementon al I.P.R., kaj ni tre dankas vin; se vi ne deziras, bonvolu skribi al la peranto, 1° ke li resendu al vi; aŭ 2° ke li konservu kiel antaŭpago por 1959a.

★

I.P.R. tre kore dankas samideanon Josef SKOPALIK, el Brno (ĉekoslovakio) kiu donace pagis 5 kĉs.




# SUR VIAN

## LA VIVO DE LA PLANTOJ

de Paul NEERGAARD

*Originale verkita en Esperanto - Desegnoj de Made Stage. STAFETO, Serio Popularscienca nº 1 - 1957 - 128 p. - 16,5×24 - Prezo : 2 usonaj dolaroj, 12 danaj kronoj aŭ egalvaloro :*

La eldonejo STAFETO jus atingas sian 10-an numeron en sia beliteratura serio kaj jen ĝi impetas en novan serion : la popularscienca, per tiu nova verko eldonata en eĉ 2.000 ekzempleroj ! Estas ankoraŭ tro frue paroli pri tiu nova serio mem ; necesas antaŭe vidi almenaŭ kelkajn el ties numeroj, sed mi havas bonajn motivojn opinii, ke tiu serio en nia moderna mondo sciencavida estos sukcesa kaj ke la eldonnombro rapide montriĝos tro modesta.

La unua volumo estas verko de Dro Paul Neergaard, mondkonata plantpatologo kaj samtempe unu el niaj plej eminentaj esperantologoj kaj aŭtoroj. « La Vivo de la Plantoj » enkondukas nin en la sekreton de la vivo, sekreto parte malkaŝita de la nuna scienco. En agrabla rakonto P. Neergaard gvidas nin manenmane en la plantan regnon. Kun li la plej komplikaj klarigoj aperas kiel simplaj memkompreneblaĵoj. Li ne eksponas seke kiel en lernolibro, sed ne malplaĉas al li prezenta ĉirkaŭvojo, kiu, taŭge elektita, igas nin rekte penetri en la koron de la demando. Rezultas simple por ni ; por la aŭtoro des pli granda la merito. Kun li, ni iniciĝas en la planta kreskado, ni ekkomprenas kiel ŝajne dormanta arbo preskaŭ subite revenas al vivo ĉe l'unua tuŝo de l' printempaj sunradioj ; ni vidas la senfinan variecon de la floraj moroj : unuj bezonas multe da lumo, aliaj minimumon por dispetaliĝi ; aŭ la kialon de sennombra varieco de la semoj : multiĝi por ne malaperi. Ni ankaŭ lernas ke en la vegetala socio envere ne estas morto sed nur kontinua renaskiĝo : Kaj tiu unika « baleto » de la kromosomoj, fenomeno maljuna kiel la vivo mem, jam de longe tre konata kaj studata, sed kiom june kaj klare esplikata !

Jen verko, kiun klera aŭ instruiĝema esperantisto havos plezuron legi. Al la spirita plezuro kaj al la nova por li kompreno pri la naturo de la hormonoj, tiuj universalaj ordigantoj de ĉia vivo, vegetala aŭ animala, li povos aldoni la plezuron de la okuloj : la libro estas bonege — kaj abundege — illustrita : bildoj plaĉaj kaj instruaj, kiel la tuta verko mem. Jen ni certe tenas la plej belan el la ĝisnunaj eldonaĵoj de STAFETO. — Plezuron ankaŭ de la esperantista koro : plian bonegan kaj montrindan verkon la movado sukcesis eldoni. Kaj tiu originala verko nepre meritas tradukon al aliaj lingvoj.

Mi ne dubas ke aliaj popularsciencaj verkoj eldoniĝos. Publiko, laŭ mi, ekzistas por ili : la tuta esperanta publiko estas relative pli klera, pli sciavida ol ordinara publiko. Kaj ĝi jam pruvis ke ĝi scias montri sian ŝaton al vere bonaj kaj konvene belaj verkoj. Unuakvalita varo ne longe restas en deponejoj.

Kelkaj vortoj pri la lingvaĵo ; ĝi estas memkompreneble bonega : memkompreneble ĉar STAFET-eldono, ĉar D-ro P. Neergaard ; ankaŭ ĉar lingve konsilis aliaj eminentuloj kiel W. E. Collinson, G. Waringhien kaj J. Regulo Perez mem.

Tamen mi ne povas ne doni mian opinion pri kelkaj detaloj, pri kiuj efektive eblas diverĝi : nia lingvo ja ne fiksiĝis en ĉiuj detaloj. La aŭtoro uzas (teknikajn do antaŭe akceptitajn ! - ?) neologismojn karakterizatajn per mal-

# LIBROBRETON

longeco : *stomo, metabolo...* kio estas tre bonvena antaŭ la alternativoj *stomato, metabolismo...* sed li lasis influi sin de nuna emo al longigo ekz-e en « *specifika* », laŭ *klasifiko, kvalifiko...* hiuj ŝajnas al mi nekonformaj ĉar Esperanto ne diras *modifiko, edifiko...* sed *modifo, edifo...* Li propone (?) uzas *inferno* (36 +5) sed konstante uzas anstataŭ *procezo* la vorton *proceso*. Au ĉu nur plumglitoj ? Mi aplaŭdas pro la formo *ovolo* nepre pli bona ol tiu de la P.V. aŭ de la Medicina Vortaro, sed kial « *konikoj* el helruĝaj floroj » (74-7). Ĉu ne temas simple pri « *konusoj* » ? *Koniko* estas alia (matematika) nocio, genra.

Tre interese, P. Neergaard enkondukas uzon de « popolaromaj nomoj » anstataŭ la tro science botanikaj, aŭ pli ĝuste paralele al ili kaj almenaŭ por kelkaj. Ekz-e « *neforgesumino* », « *Hajltrua malsano* » k.a. Tamen la esprimo « *vergo d'oro* » ŝajne ne estas sukceso. La « popolo » ne uzus tian esprimon, eble ĉar ĝi ne emus nekorekte difekti prepozicion, sed certe ĉar audante tiun vorton ĝi skribus ĝin tute alimaniere : nekompreneble ! Kial ne : orvergo, ora vergo, aŭ ankaŭ verg'el oro ?

Kvazaŭ ne estas preseraroj. Tamen legu : « sed *se* pluraj hormonoj » (35 -1); forigu akuzativon en : surfluas hormonaj kaskadoj (36 +3).

Resume : unu el la plej bonaj verkoj de la lastaj 10 jaroj.

A. A.

★

## DEKKINGA FUĜAS

**de Tjeerd ADEMA**

*Tradukis el la nederlanda* F. FAULHABER. *Eldonis Dansk E-o-Forlag. Aabyhoj.* 1957. 220 *p.* 13,5×21,5.

---


Bonulo pro troa ekscitiĝo mortigas sian guvernistinon. Li fuĝas por « konservi sian liberon » kaj eĉ sukcesas transpreni personecon de mortinto kaj lin plene anstataŭiĝi! Li devas daŭrigi lian vivon : ne nur supraĵe sed en ĉiuj manieroj : profesio, amataj ideoj kaj ankaŭ... amataj virinoj. Ĉu li estos malkovrita? Li sukcesas venki ĉiujn barojn unu post la alia sed du virinoj suspektas la aferon : la « realista » serĉas, trovas kaj volas elprofiti; la amanta, kiu trovis en la bonulo « sian idealon », simple fidas la amaton kaj atendas ĝis li mem konfesas! Kiel finiĝos tiu komplika situacio?

Tion mi lasos vin legi, sed ankoraŭ pli ol interesa pro siaj peripetioj, tiu romano estas streĉa pro la psikologia flanko. Jen homo kiu scias nenion, aŭ preskaŭ, de vivo kaj tamen devas rekonstrui ĝin ĝis en la detaloj, samtempe subpremante la proprajn impulsojn.

Eble la kanvaso de la rakonto estas iom fantazia sed tre simila studo povus esti farita konsiderante homon kiu perdus memoron kaj devus ĉion retrovi.

La verkon tradukis el la nederlanda F. Faulhaber, membro de la akademio. La traduko estas tre flua kaj agrable legebla. Vi ne bedaŭros la aĉeton de tiu streĉa romano.

A. A.



43-a
UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO

MAINZ
GERMANUJO
2.-9. 8. 1958

# 3-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO

□

**CELO:**

La Infana Kongreseto estas konstanta institucio en la sino de la Universalaj Kongresoj. Ĝi celas kunigi diverslandajn infanojn sur la bazo de komuna neŭtrala lingvo, Esperanto, kaj per tio eduki ilin al internacia amikeco, plivastigante ilian estontan vivhorizonton. La Kongreseto helpas la tiucelajn klopodojn de la gepatroj kaj montras la eblecojn de dulingva edukado kaj de praktikado de Esperanto en la familia medio.

**KONGRESEJO:**

La 3-a Infana Kongreseto okazos en la Feria Domo de Gonsenheim, atingebla per kvaronhora tramveturado de la stacidomo. Tramoj: 10 aŭ 11 de la Stacidomo ĝis la haltejo « Mombacher Strasse ».

**ĜENERALAJ INFORMOJ:**

La Kongreseto estas rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj povas kompreni kaj paroli Esperanton kun samaĝuloj. Ĝi okupos la etulojn dum la tago per varia programo. La infanoj povas loĝi en la Feria Domo, kie ili estos prizorgataj de specialistaj komisiitoj. Nur la gepatroj povos viziti la gefiletojn, vespere inter la 18-a kaj la 19-a h., escepte dum la tuttaga ekskurso. Dum aliaj horoj kaj dum la ekskursoj oni ne akceptos vizitantojn.

**KOMUNA VIZITO:**

Ĉiuj gepatroj, pedagogoj kaj amikoj de infanoj, esperantistaj kaj neesperantista, estos akceptataj merkredon posttagmeze, la 5-an de aŭgusto, por amika kunesto kun la infanoj.

**DATOJ:**

La Kongreseto malfermiĝos sabaton la 2-a de aŭgusto je la 8-a h. kaj fermiĝos sabaton la 9-a de aŭgusto je la 12-a h.

**KONDIĈOJ:**

La aliĝkotizo estas fiksita je 25 germanaj markoj. Ĝi inkluzivas ĉiujn servojn kaj programojn de la Infana Kongreseto, nome matenmanĝon, du ĉefmanĝojn, posttagmezan manĝeton, ekskursojn, amuzaĵojn, festojn, dumnoktan restadon, prizorgadon kaj asekurojn. La Kongreseto akceptos senpage ĝis du esperantistaj infanoj el familioj en nebonstataj cirkonstancoj. La Infana Kongreseto okazas dank'al financa subteno de la Universala Kongreso.

**PROGRAMO:**

h. 7,30 vekiĝo; h. 8,15 matenmanĝo; h. 9 promenadoj aŭ ekskursoj; h. 13 tagmanĝo; h. 14 ripozo (dormeto); h. 15 ludoj; h. 16,15 manĝeto, refresaĵoj; h. 16,30 amuzaĵoj, prezentadoj; h. 19 vespermanĝo; h. 20/21 enlitiĝo.

**EKSKURSOJ** k.t.p.

Okazos diversaj ekskursoj kaj filmomontrado.

# NIAJ PERANTOJ

**AUSTRA:** O. St. R., **Dr E. J. Goerlich,** Wien, IX, Waehringerstrasse 59. Poŝtĉeka konto: 30 461. Jarabono: 32 aŭstraj ŝilingoj.

**BRAZILA: Cooperativa Cultural dos esperantistas,** Caixa postal 3 881 Rio de Janeiro D.F. Jarabono: 90 Kruzeroj.

**BRITA: The British Esperanto Association,** 140 Holland Park Ave., London, W 11. Jarabono: 9 ŝilingoj.

**BULGARA: Bulgara Esperantista Asocio,** Bul. Stalin 40, Sofia. Jarabono: 9 levoj.

**DANA: Dansk Esperanto-Ferlag,** Ingemannsvej 9, Aabyhoj. Poŝtĉeka konto: 16 295. Jarabono: 9 kronoj.

**GERMANA: Helmut Rössler,** 22b, St-Martin. Poŝtĉeka konto: 43 357 Ludwigshafen/t Rhein. Jarabono: 5 markoj.

**HISPANA: E. Calvet,** Pl. Gral. Sanjurjo, 7, Tarragona. Konto N° 956 293 ĉe Banco Espanol de Credito. Jarabono: 55 pesetoj.

**HUNGARA: Martin Lajos,** Esperanto, Bors-u-2, Budapest XII. Jarabono: 24 forintoj.

**ITALA: Eduardo Zumbo,** Casella Postale 226, Torino. Jarabono: 750 liroj.

**JUGOSLAVA: Josip Vajdlih,** Podolje 15, Zagreb. Poŝtĉeka Konto: Gradska ŝtedionica, Zagreb, 40 KB 6, N° 4 653. Jarabono: 410 dinaroj.

**KANADA: Rüdiger Eichholz,** Esperanto Press, Oakville, Ont. Jarabono: 1,25 dolaroj.

**NORVEGA: Erling Holten,** Leangen i Strinda. Jarabono: kronoj. 9.

**NEDERLANDA: Verbruggen,** Oosterhesselenstraat 560, Den Haag. Jarabono: 3,5 guldenoj.

**POLA: Asocio de Esperantistoj en Pollando,** ul. Kozia 3, Varsovio. Jarabono: 50 zlotoj.

**SOVET-UNIA: Roberto Dvorkin,** Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad 22, Kirovskij 42.

**SUOMA: Joel Vilkki,** Somero. Poŝtĉeka konto: Tu 60 253. Jarabono. 400 markoj.

**SVEDA: Eldona Societo Esperanto,** Box 7 043, Malmö 7. Poŝtĉeka konto: 578. Jarabono: 6 kronoj.

**SVISA: Grajnoj en Vento,** IV-a 9 485, Marcel Erbetta, 66, rue des Pins, Bienne-Biel 7. Jarabono: 5 svisaj frankoj.

**USONA: Jarvis E. Bush,** 3 700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin. Jarabono: 1,5 dolaroj.

**ALIAJ LANDOJ:** Sin turni al nia administranto: **R. Delagneau,** Avrolles, par Saint-Florentin (Yonne), Francio, Poŝtĉeka konto: Dijon, N° 1448 87. Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn: Jarabono: 500 francaj frankoj, aŭ 17 steloj, aŭ 12 internaciaj respondkuponoj. Ni daŭre serĉas perantojn.

# " INTERNACIA KULTURA FERIO " de G. E. E.

## BESANÇON (Doubs) FRANCIO

de la 10a ĝis la 31a de aŭgusto 1958

★

***Informojn sendas :***

Sro **E. BIDOIT** - 6, rue de la Paix - **BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francio

Aldonu respondkuponon


## ATENTU

Anoncoj, reklamoj por FRANCIO, vi aperigu en « Esperanto et Culture », eldonnombro 1.000 - Skribu al : Fino G. JOUBERT, 21, rue Regnault, SAINT-QUENTIN (Aisne), FRANCIO - Samaj kondiĉoj kiel por anoncoj en I.P.R. - Pĉk : LILLE no 3041-30.

I.P.R. - PROVSENDOJ

Sendu adresojn de interesotaj personoj (geinstruistoj) ne abonantoj cele al prov sendaĵoj al :

Sro DELAGNEAU - Avrolles par ST-FLORENTIN (Yonne), FRANCIO.

## ANONCETOJ

### LA ESPERANTISTA STUDENTO

ĵus kreita gazeto, kun abono de nur 150 F. (6 int. rkp.) petas vian subtenan abonon, eĉ se vi ne plu estas studento. Ĝi aperigos - nur en Esperanto - ankaŭ felietonojn, anekdotojn, konkursojn, filmorecenzojn, k.t.p. Kotizu al « La Esperantista Studento », 34, rue de Chabrol, PARIS 10o; p.ĉ.k. 16466-58 Paris.

### ANTAŬ LA INFANKONGRESO

- Terglobanoj serĉas korespondantojn inter infanoj, kiuj partoprenos la kongreseton en MAINZ 1958. Oni sin turnu al Karen BJORNSBY, Ludo-ĉambro, Hartmannsvej 23, HELLERUP, Danujo.

- 10-jaraĝa knabo, vizitonto de MAINZ, deziras kontaktiĝi kun geinfanoj tutmondaj per bildkartoj. Bernd KESSLER, Kieler Str. 28, DRESDEN-KLOTZCHE, Orienta Germanujo, DDR.

Deziras korespondi pri literaturo, lingvisuko, pedagogio, vivo de popoloj, moroj, kutimoj. Interŝanĝos librojn, albumojn, k.t.p. R. RALCEVSKI, instruisto, Valĉi Dol - Varnensko (Bulgario).

### LA VOLO POPOLA

(franclingve « La Volonté Populaire »)

pacista, esperantista kaj socia, enhavas dulingvajn artikolojn, Peti specimenon kontraŭ I rpk al : Sino LAIDAIN, ĉe Mme JAUZIN 25, rue Marbeuf, PARIS (8e), Francio.

### INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

Helsingor - Elsinoro, Danlando
19 - 26 julio 1958

Internaciaj kursoj kun pli ol 100 partoprenantoj okazos en «la Internacia Altlernejo». Instruado nur antaŭtagmeze en 5 malsamaj kursoj : daŭriga, konversacia, rapida, prepara, porinfana.

Petu belan prospekton de L. FRIIS, Ingemannsvej 9, AABYHOJ, Danlando.

**INFANA PENTROARTO** (I.P.R. no 1 - p. 15-16). Departementa sekcio U.F.O.L.E.A. (arta edukado) deziras starigi ekspozicion tiuteman. Bezonos infanpentraĵojn eksterlandajn. Skribu aŭ sendu al : Sro MUSSIER, École du Jeu-de-Paume, MOULINS (Allier), Francio.


IMPRIMERIE A. POTTIER et Cie — MOULINS.
Dépôt légal : no 12, 1er trimestre 1958.

Publication bimestrielle

*Le Directeur-Gérant :* G. MUSSIER.